




BOHEMA REVUO ESPERANTISTA

kun literatura aldono

LEGOLIBRO DE BOHEMAJ ESPERANTISTOJ

Oficiala organo de bohemaj Esperantistoj kaj de CENTRA ASOCIO BOHEMA UNIO ESPERANTISTA (B. U. E.)

Ni laboros por Esperanto.


CENTRA ASOCIO BOHEMA UNIO ESPERANTISTA.
— SÍDLO: PRAHA I. 342. KAVÁRNA „UNION". —
KANCELÁŘ A UČEBNA: II. VODIČKOVA ULICE 38.
REDAKCE REVUE: II. DITTRICHOVA ULICE 7.

Členové klubů sdružených v „Ústředním Svazu Bohema Unio Esperantista" a těch, které za jeho součinnosti se ustavují, dostávají tuto revui za roční předplatné K 2·50 prostřednictvím pp. jednatelů.
Roč. I.—V. pro členy B. U. E. po K 2·20.

Svaz jednotlivců „Ligo de Bohemaj Esperantistoj", Klub Esper. v Praze („U Donátů") a Klub Esp. v Radvanicích dávají členům tuto revui zdarma.

1912. **ÚNOR — FEBRUARO** **VI. 2.**

Roční předplatné: 3 K. Ročník I.-V. po K 2·50. **Cena tohoto čísla s přílohou: 30 hal.**

ČASOPIS ČESKÝCH ESPERANTISTŮ
BOHEMA REVUO ESPERANTISTA

vychází 10krát ročně (kromě srpna a září). | eliras monate (krom aŭgusto kaj septembro).

Redaktor: **Ed. Kühnl.**

Předplatné (ročně **3 K** pro Rakousko, Fr. 3·75 pro cizinu), a vše týkající se časopisu, budiž zasláno pouze na adresu: „Časopis Českých Esperantistů", Praha II.-2023, Dittrichova ul. 7. Redakce vyhražuje si právo upraviti články pro tisk. Netištěné rukopisy se vrátí, byla-li přiložena známka; pracem původním dána přednost. Abonpago, akceptata por almenaŭ unu jaro (**Fr. 3·75** = 1·50 Sm por fremdlando, 3 K por Aŭstrio), kaj ĉio, kio koncernas la gazeton, estu sendata laŭ adreso:

„Časopis Českých Esperantistů" en Praha II. (Bohemujo - Aŭstrio). II.—2023. Dittrichova ul. 7.

Účet poštovní spořitelny 93.281.


* *

OBSAH - ENHAVO:

LA SKRIBARTO.

(*De F. J. Havelka, eksasistanto de la reĝa artakademio en Leipzig.*)

La skribarto estas tiel malnova, kiel la kulturo mem. Precipe en la mezepoko skribis monaĥoj kaj specialaj skribistoj librojn kaj ornamis ilin per koloraj inicialoj kaj aliaj desegnaĵoj. Skribita libro estis bela donaco kaj multe ŝatata. Sed ankaŭ aliaj skribaĵoj, leteroj ktp. estis faritaj kun estetika kompreno por la efiko. La libropresado eltrovita ĉirkaŭ la jaro 1440. p. Kr. fariĝis granda konkuranto de la skribarto, ĉar la presitajn librojn oni povis pli rapide kaj pli malmultkoste pretigi.



Diplomo skribita per plumo „Ly“ de la f-o Heintze & Blanckertz.

Anglo William Morris komencis denove skribi tutajn paĝojn kaj verkis belajn presaĵojn, sur kiuj harmoniis literoj kun ornamento mirinde. Anglaj desegnistoj, inter ili Johnston, grupigitaj ĉirkaŭ Morris, skribis artiste librojn, kiuj atingis komprenon de la artamantoj kaj altan prezon. Germanaj artistoj baldaŭ sekvis la anglan ekzemplon kaj hodiaŭ ili havas ne nur bonajn literojn por kompostado, sed la skribarto estas en Germanujo instruata en diversaj fakaj kaj artmetiaj lernejoj, eĉ en artaj akademioj. En Wien instruas litera reformatoro prof. Rudolf v. Larisch, kiu eldonis kelke da bonaj faklibroj pri tiu ĉi speciala arto. Skribartistoj uzas por la skribado diversajn skribilojn, ekzemple kilo-

plumojn, korkon, kanoplumojn, lignoskribilojn ktp. La malnova berlina firmo, fabriko de plumoj Heintze & Blanckertz vendas specialajn plumojn por oportuna kaj tipa skribado nome: „Ly“, „To“, „Ato“, „Redis“, „Mi-Lyd“ ktp. kaj publikigas bonan fakliteraturon pri la skribarto. Granda merito de la nomita firmo estas kreo de la muzeo por skribartaĵoj en Berlino.

La skribarto havas gravan signifon: oni povas per ĝi verki belajn ĉiuspecajn estetikajn presaĵojn, sed ankaŭ la persona skribado fariĝas originala, tipa. Granduloj kiel Shakespeare, Rousseau kaj aliaj havis propran karakterizan skribon, kiu karakterizis ilian personon — — nia instruado pri skribado nepre bezonas reformon. La diferenco en la instruado estas ĝenerale nur tia: laŭ la malnova maniero la lernanto kopias ekzakte literojn, kiujn aŭ la instruisto skribis sur la tabulo aŭ imitas presitan modelon de literoj; laŭ la nova skolo la lernanto estas edukata, ke li skribu persone — karakterize.

J. Arbes:

LA UNUA IDEALO.

Pasis jam multaj jaroj de tiam — bedaŭrinde, ke pli multe ol tridek . . .

Kvin semajnojn mi dum la libertempo pasigis migrante tra Bohemujo. Mi migris piede de vilaĝo al vilaĝo, de urbo al urbo — jen sur imperia ŝoseo, jen sur simplaj kampvojoj kaj tuj refoje sur irvojetoj — jen tra kampoj, jen tra arbaro — laŭlonge de riveroj aŭ riveretoj . . .

Kaj ĉio ĉi tio preskaŭ sencele.

Risorto de tio estis ia neklarigebla malkvieteco, kiu ekokupis min. Mi sopiregis pri io nekonata, nekomprenebla.

Ne estis ja ankaŭ mirinde!

En la dekoka jaro estas preskaŭ ĉiu el ni pli ofte, ol tio estas konforma al lia naturo — melankolia. Sentema sopiremo kaj delikata, ofte tute senreala nostalgio emociigas la koron. Ni sopiras pri „dolĉa mistero“ kaj iom post iom ĝermas en niaj animoj idealo de kreitaĵo, al kies piedoj ni kunportus ĉion, kies unusola rigardo nin feliĉigus kaj ravigus, kies spiro nin svenigus.

Mi sentis min simile.

Antaŭ mia anima rigardo flugpendadis en momentoj de izoleco etera estaĵo de rozkoloraj sonĝoj: libele gracitalia knabino kun pala vango — arda, nigra okulo, fulgonigra hararo kaj kun spiritoplena, melankolie dolora esprimo en la vizaĝo de antika simetrieco.

Unusola rigardo, unusola vorto, unusola manpremo estus sufiĉinta por plenumi la flamantan sopiron . . . Sed kien ajn mi venis, kie ajn min la okazo favoris, ke mi povis renkonti knabinojn, neniu estis de la aera fantomo de miaj sonĝoj eĉ la plej malgranda signo.

Mi memoras, ke dum la helaj someraj tagoj, precipe dum ravigaj lunhelaj vesperoj kaj noktoj min emociigis en momentoj de izoleco la dolĉturmenta sopiremo, ĝis poste iam, tieldire subite, mia stato anima ŝanĝiĝis.

Malvarma vento ekblovis trans la postrikolta kampo, dum la nokto kovriĝis la firmamento de monotone griza nubo — kaj mian animon ekokupis neklarigebla dezerteco.

La antaŭe tiom alloga sencela vojaĝado subite min ektedis,

„Hejmen — hejmen!" murmuris la demono de ĉagreniĝo en mian animon, kaj mi obeis.

La tago estis ordinara kaj duonmalhela, kiam mi ekiris por la reveno. Mi devis iri proksimume ses horojn da vojo piede, por atingi pli grandan urbon, de kie kondukis fervojo al Praha.

Mi iris tamen malrapide, mi atingis la urbon nur antaŭ vespero kaj tuj mi direktis min al la stacidomo. La vagonaro estis forveturonta post kvaronhoro.

En la vestiblo, en koridoroj kaj en la atendsalonoj regis kutima vigleco kaj bruo. Min tamen la zumanta homamaso ne interesis — apenaŭ mi al tiu aŭ alia fizionomio dediĉis momenton da atento.

Jam mi intencis direktiĝi al la kaso, kiam mia rigardo preter-volе ankoraŭ unu fojon rondirante super la bruanta amaso, okaze fiksiĝis sur virina staturo apud la lasta kolono de la vestiblo, kie ne svarmis tiom da homoj, kiel en la antaŭo kaj proksime de la kaso.

Mi restis kvazaŭ senkonscia.

La idealo de miaj sonĝoj staris nur kelke da paŝoj antaŭ mi.

Ĝi estis palvizaĝa, apenaŭ deksesjara knabino de poezie melankolia esprimo en la vizaĝo de antika senmakula perfekteco.

Mi memoras nenion plu krom ke ŝi estis vestita per nigra silka vestaĵo de la plej eleganta fasono kaj ke mallonga nigra vualo kovris ŝiajn frunton kaj okulojn. En unu mano ŝi tenis malgrandan vojaĝvalizon kaj delikate sin apogante je la kolono, ŝi rigardis kviete ien en nedifinitan malplenon.

Priskribi la impreson, kiun faris je mi tiu ĉi neatendita apero, estas absolute neeble. Mi ne scias ja eĉ, kiom longe mi en ekstazo staris, fiksante sur la knabino nedeturneble la rigardon.

Post momento alpaŝis al ŝi iu ne junaĝa sinjoro kaj ion al ŝi flustris. Ŝian ĉarmobelan vizaĝon transflugis delikata ekrideto

de dankemo. Ŝi klinis la kapon kaj ankaŭ ion ekflustris. Poste la sinjoro prezentis al ŝi la brakon, ŝi enmetis la sian kaj ambaŭ malrapide, paŝo post paŝo iris al la pordo, kondukanta al la perono.

Malgraŭvole mi ŝteliris post ili.

La vagonaro staris veturpreta — ĵus estis sonorigite la duan fojon.

La sinjoro kaj la knabino direktiĝis al vagono de dua klaso antaŭ kiu ili haltis.

Al subiro kliniĝanta suno ekpenetris okaze tra la ruĝnuanca nubo kaj ĉirkaŭe etendiĝis nedireble melankolia aŭtuna duonlumo.

En tiu momento la knabino ekrigardis kontraŭ mi. Freŝa ventbloveto formovis la mallongan vualon de super ŝiaj okuloj, en kiuj refleksiĝis ruĝnuanca sed malvarma fulmo . . . Ili estis vitraj . . .

Mi restis frostrigida.

Kio estis okazanta en mia animo, kontraŭstaras al priskribo. Mi scias sole, ke nur post longa momento mi rememoriĝis, ke mi ne havas veturbileton.

Rapidpaŝe mi revenis al la kaso. Tamen pli frue, ol mi atingis ĝin, eksonis la tria sonorado — la kaso estis jam fermita.

Trad. Fr. Dus.

PROPAGATORŮM.

Námitka 5. **Proč nepřijati za pomocný jazyk latinu?**

Hlavní podmínkou, které musí jazyk národní vyhovovati, jest snadnost, protože musí býti používán všemi a nikoliv pouze osobami, které mají nadprůměrné prostředky peněžní nebo inteligenci. Proto latina nevyhovuje, neboť pro své výjimky, idiomismy a pod. vyžaduje dlouhých studií: jest dokázáno, že, ačkoliv již ode dávna vyučuje se jí na školách, nestala se mezinárodním prostředkem dorozumívacím. Druhá podmínka, které musí jazyk mezinárodní vyhověti, jest schopnost vyjádřiti všechny rozumové pomysly moderních lidí a stanoviti výrazy pro tyto pomysly. Nuže, latina ve středověku a později zůstala mezinárodním jazykem učenců, pokud bylo jí třeba, aby byla prostředkem k vyjádření jejich vysokých pomyslů, prostředkem, který nemohli nalézti v živých jazycích národních. Když se však tyto jazyky staly k tomuto účelu vhodnými, nastalo zanikání latiny. Dnes mohla by snad latina vyjádřiti ony pomysly, ale jistě ne jejich výsledky: bylo by proto třeba k ní přidati mnoho nových slov, která by ji znešvařila. Latina tak doplněná stala by se pak téměř novým jazykem a nebyla by již onou krásnou klasickou latinou. — Bylo

navrženo jiné řešení, které by záleželo ve zjednodušení latiny, ale pak jest to sestavování nového jazyka umělého, který měl by z latiny pouze jméno a to nespadá již do této otázky.

Námitka 6. **Proč nepřijati za pomocný jazyk řeč živou?**

Na tento návrh nutno odpověděti ze dvojího hlediska: jazykozpytného a politického. Z prvního odpovíme důvodem, který uvedli jsme při latině: kterýkoliv národní jazyk jest velmi těžký, výslovnost, pravopis a skladba obsahují výjimky a zvláštnosti, které činí jen určité vrstvě příslušníků jiného národa možným osvojiti si jazyk ten. Nuže, mezinárodní jazyk, který potřebujeme, musí býti užíván všemi a nikoliv pouze nejcvičenějšími nebo nejbohatšími; má za úkol sblížiti všechny, protože všichni mají právo těžiti z tohoto velikého pokroku. Ale lidem nevelikého vzdělání nikdy se nepodaří mluviti dokonale cizí řečí, neboť jest známým faktem ze zkušenosti, že lze se jí dokonale naučiti pouze když bydlíme v zemi, kde se řečí tou mluví, a tito z mnoha důvodů nebudou moci tak učiniti. Tudíž národního jazyka, který by byl zvolen, bylo by nepochybně velmi špatně užíváno v cizích zemích a poruchy ty časem vnikly by i do jejího domova. Proto ti, kdož chovají v lásce svůj jazyk národní, nemohou si přáti, aby stal se mezinárodním. A dále, kdyby chtělo se přikročiti k volbě nejvhodnějšího z jazyků národních, byl by dán podnět nekonečným diskusím aniž by se docílilo výsledku. S hlediska politického poskytlo by zvolení jazyka národního výhodu tomu národu, jemuž jest vlastní, vůči všem národům jiným: proto nikdy by se národové neshodli na takové volbě, zvláště nyní, když u všech, i u nejmenších národností lze konstatovati vytříbený smysl individuality a neodvislosti, jejichž hlavním projevem jest řeč. — Ostatně který jazyk zvoliti? Zeptejme se někoho a jistě bude nám tvrditi, že jeho mateřština nepochybně z toho nebo jiného důvodu, musí býti zvolena. Bylo také navrženo, přijmouti současně dva jazyky národní: odpověď jest tatáž: co by tomu řekli ostatní národové?

SICILIANA EL „CAVALLERIA RUSTICANA“.

Ho, Lolo, simila al printempfloro,
mi vin adoras, kiel sunon helan,
ĉar viaj kisoj kun la amsufloro
al mi prezentas sur la ter' vivon ĉielan.

Mem signo sanga pordon gardu vian,
timas neniun homon mi envian,
pro vi mi mortos, iros al ĉielo,
sed mi revenos, ne vin trovonte anĝelo.

JAZYKOVÝ RÁDCE — LINGVA FAKO.

Longe mi ne sciis, ĉu mi veturu al la kongreso aŭ ne, sed kiam mi eksciis, ke la definitiva dato estas fiksita je tempo por mi konvena, mi tuj ekrilatis kun la amikoj loĝantaj en la kongresurbo kaj tuj mi petis informojn ĉe la loka vojaĝagentejo. Poŝtrevene mi ricevis leteron kun detala vojaĝprogramo kaj de post tiu tempo mi ricevadis ĉiusemajne la bele ilustratan gazeton „Turisto“, kiun sendadis al mi la agentejo por reklamo. Fine alvenis la tago, kiam mi estis forveturonta.

Miaj pakajoj estis preparitaj kaj ekspeditaj jam la antaŭan labortagon, ĉar dimanĉe ili ne estas ekspedataj. Mian negrandan manvalizon mi kunportis al la stacidomo. Kiam mi estis eniranta en la stacidomon, mi ekvidis tie amikon N., kiu ofte iradis preter mia loĝejo, kiam mi estis loĝanta en la somerdoma kvartalo. Ankaŭ li estis veturpreta kaj jus li estis aĉetinta al si bileton por vojaĝo en Parizon. Aŭdinte (estinte aŭdinta) pri la celo de lia projektata vojaĝo, mi invitis lin veturi (ke li veturu) kun mi al la kongreso Antverpenon. Li konfesis, ke li estis delogita per entuziasma rakontado pri la franca metropolo, kaj nun ke li sekve ne scias, kion li faru, ĉu li preferu viziti Parizon aŭ ĉu li min akompanu. Evidente ĉagrenita li certigis, ke, se li estus sciinta, ke mi estas veturonta al la kongreso, ke li

Dlouho jsem nevěděl, máme-li jeti na kongres nebo ne, ale když jsem se dověděl, že konečné určené datum jest stanoveno na čas pro mně příhodný, ihned jsem navázal styky s přáteli bydlícími v kongresním městě a hned jsem žádal o informace místní cestovní kancelář. Obratem pošty dostal jsem dopis s podrobným programem cesty a od té doby jsem dostával týdně pěkně illustrovaný časopis „Turisto“, který mi cestovní kancelář pro reklamu posílala. Konečně nadešel den, kdy jsem měl odjeti (kdy mi bylo odjeti).

Moje zavazadla byla připravena a odeslána již předešlého všedního dne, poněvadž v neděli nejsou odesílána. Svoje nevelké příruční zavazadlo jsem nesl ssebou na nádraží. Když jsem vcházel do nádraží, spatřil jsem tam přítele N., který chodíval kolem mého bytu, když jsem bydlel ve villové čtvrti. Také on byl připraven k odjezdu a právě si byl koupil lístek na cestu do Paříže. Slyšev (uslyšev) o cíli jeho zamýšlené cesty, pozval jsem ho jeti (aby jel) se mnou na kongres do Antverp. Doznal, že byl zlákán nadšeným vypravováním o francouzské metropoli a nyní že tudíž neví, co má dělati, zda raději navštíviti Paříž nebo mne doprovázeti.

Očividně rozmrzen ujišťoval, že, kdyby byl věděl, že pojedu na kongres, že by se mi byl raději

estus preferinta proponi sin al mi kiel kunulo, ĉar li estis certa, ke mi, kiel lia bona amiko, lin kiel kunulon ne rufuzus. Dum tiu ĉi interparolado ni promenadis sur la perono kaj nur kiam ni estis atentigitaj pri tuja forveturo de la pariza rapidvagonaro, ni devis disiri. Ankoraŭ momenton kaj mia amiko estis jam forveturanta. Post kiam li estis forveturinta, staris mia vagonaro jam preta por ekveturi kaj estis forveturonta post du minutoj. Ĉar estas malpermesite transiradi la relojn, mi devis iri tra la subtera komunikejo kaj sekve mi devis tre rapidi.

nabídl za společníka, poněvadž byl jist, že já, jako jeho dobrý přítel, bych jej jako společníka neodmítl. Za tohoto rozhovoru jsme se procházeli na peronu a teprve když jsme byli upozorněni na okamžitý odjezd pařížského rychlíku, museli jsme se rozejíti. Ještě okamžik a můj přítel již odjížděl. Když odejel, stál můj vlak již připravený k odjezdu a měl odejeti za dvě minuty.

Protože jest zakázáno přecházeti koleje, musel jsem jíti podzemní chodbou a měl jsem proto velmi na spěch.

Z CELÉHO SVĚTA.

VIII. světový kongres esperantský v Krakově 1912 (11.-18. srpna). Sjezdový výbor oznamuje měsíčními výkazy postup přípravných prací: všem redakcím esp. časopisů jsou zasílány tyto zprávy k uveřejnění. Legitimace sjezdová stojí 6 Sm. (K 14·40). Prvním několika stům přihlášených jest současně s legitimací zaslána Grabowskiho esp. hymna: „La tagiĝo“. Členové rodiny mají právo súčastniti se sjezdových jednání za poloviční příspěvek, rovněž slepci platí poloviční cenu a požívají všech výhod. Legitimace čís. 1. bude vydražena a připadne tomu, kdo nabídne do 1. května nejvyšší obnos. Zvláštní výbor má na zřeteli ubytování kongresních hostí. V nejbližší době bude uveřejněn seznam bytů, k jehož sestavení poskytl materiál městský úřad. Studující ubytováni budou za výhodných podmínek (6 dní 3 K). Sjezdový výbor obrátil se se žádostí o podporu na jednotlivá ministerstva a zemský sněm, jehož člen dr. Leo, starosta města Krakova, slíbil podporovati příznivé vyřízení žádosti. Vedle průvodce po Krakově, který nedávno byl vydán, bude vytištěn průvodce Tatrami a Zakopaným (cíl společného výletu) a zvláštní průvodce po uměleckých památkách krakovských kostelů. Přijímací sjezdová kancelář bude umístěna v budově obchodní akademie, jejíž ředitel Kannenberg jest horlivým příznivcem Esperanta. Vynikající herci krakovského měst. divadla sehrají Słowackiho drama „Mazepa“ (esp. překlad Grabowskiho vydala právě fa Hachette v Paříži; cena 2 K). Podrobnosti o literárním konkursu budou uveřejněny v příštím oběžníku. V seznamu tratí mezi 30 „hlavními esp. středisky“ a Krakovem pořadatelstvo nejmenuje Prahu, vzdálenou přes 200 km. a odkud pravděpodobně lze očekávati větší počet účastníků než na příklad ze Solunė, Helsingforsu nebo dokonce Lisabonu! Jízdné

z Prahy do Krakova K 21·80 (III. tř. rychlíkem). Adresa výboru pouze: VIII. Kongreso Esperantista en Kraków, Galicio.

Královská knihovna a museum esperantské jest nyní založeno v Drážďanech pod správou státních úřadů. Každý má právo vypůjčovati si knihy, prohlížeti cenné rukopisy, obrazy atd., které jsou umístěny v budově sněmovny „Ständehaus". Správa knihovny s díky přijme a zařadí veškeré publikace esp. (cenníky, programy, neúplné ročníky časopisů, stanovy). Adresa: Reĝa biblioteko. Dresden-Ständehaus, Zimmer 38.

U. E. A. (Universala Esperanto Asocio) ustavila právě podle usnesení svého sjezdu zvláštní **odbor** pod názvem „Universala Interŝanĝa Asocio" pro výměnu pohlednic, dopisů a známek. Členové dostávají za roční příspěvek K 1·20 (vedle příspěvku do svazu U. E. A.) čtvrtletní seznam ostatních přihlášených, s nimiž mohou navázati styky. — Letošní ročenka „Jarlibro" obsahuje na 170 str. seznam všech delegátů sestavený podle měst a řadu cenných informací. Všem členům, kteří zaplatili příspěvek za letošní rok, byla zaslána ročenka přímo ze Ženevy s legitimací.

Drážďanský klub esp. (Hotel Stadt Rom) podjal se v zájmu Esperanta úkolu dosáhnouti pomocí Esperanta přesných informací o nejrůznějších otázkách, které státní ústavy přejí si získati cestou veřejných anket. V revui „Universo" jsou právě uveřejněny důležité dotazy o zřízení poštovním ve všech zemích (městském a venkovském) a o průmyslu týkajícím se výroby barev. Doporučujeme, aby interessenti obrátili se na adresu: Dr. Rübencamp, Dresden, Schubertstr. 8.

20.000 franků na propagandu Esperanta! Světoznámý továrník pneumatik a příznivec aviatiky Michelin v Paříži, proslovil na obvyklé měsíční hostině pařížských Esperantistů přípitek, v němž poukázal na to, že stálým zdokonalováním aeroplánu jako prostředku dopravního staví se vzduchoplavcům v cestu jiná překážka, kterou pouze Esperanto může odstraniti — neznalost dostatečného množství cizích řečí, jichž území musí letec po několikahodinném letu minouti. Zmíniv se o rychlém vzrůstu vzduchoplaveckých rekordů, vyslovil naději, že nebude daleka doba, kdy aeroplány budou se pohybovati rychlostí 400 km. za hodinu, při níž ovšem každé přistání uvedlo by letce do jazykově nejrůznějších zemí a neznalost jazyka byla by v každém případě překážkou jakéhokoliv úspěchu. Uvažuje tyto okolnosti, poznal, že jediným východiskem z této situace jest znalost jazyka pomocného a proto na doporučení příznivce Esperanta Archdeacona věnuje se svým bratrem 20.000 franků, které mají býti koncem letošního roku rozděleny žákům francouzských škol, kteří vykáží nejlepší prospěch v Esperantu. André Michelin, rytíř Čestné legie věnoval již půl millionu franků na odměny za nejlepší aviatické výkony.

Na III. Mezinárodní vzduchoplavecké výstavě v Paříži bylo zastoupeno Esperanto exposicí fy Hachette. Na dva tisíce propagačních brožur o Esperantu bylo rozprodáno návštěvníkům.

Esperanto schválily a za jednací řeč přijaly následující **mezinárodní kongresy:** r. 1903 kongres automobilistů v Paříži; roku 1904 malířů v Grenoblu a r. 1905 v St. Quentinu; r. 1906 kongres hudebníků v Miláně; r. 1906 zubních lékařů v Ženevě, r. 1908 v Brusselu a r. 1909 v Berlíně; r. 1907 kongres antialkoholiků ve Stokholmu; r. 1908 lékařů v Budapešti a r. 1909 v Rio de Janeiru; r. 1909 kongres slepců v Neapoli; r. 1909 psychologů v Ženevě; téhož roku kongres stenografů v Rouenu; roku 1910 fotografů

v Brusselu; r. 1910 katolíků v Paříži a r. 1911 v Haagu. Krom toho ústřední kancelář svob. zednářů v Bernu koresponduje v Esperantu. Rovněž kancelář mezinárodních společností v Brusselu přijala Esp. officielně. Společnost pro obchodní vyučování vydává prospekty esperantské. Missionáři v Indii a řád nových Maltesianů uznávají a užívají Esperanta a konečně pacifisté již od roku 1905 užívají Esperanta officielně.

Propagační cesta E. Privata, který již loňského roku uspořádal na 250 přednášek o Esperantu ve Spojených Státech Sev. Ameriky, setkává se s nejlepším úspěchem. Koncem loňského roku navštívil jižní Francii, severní Italii, Sasko, Halič a Rusko. Významnou byla jeho audience u presidenta Roosevelta ve Washingtoně a **u italského krále Viktora Emanuela**, který věnoval jeho vysvětlivkám přes půl hodiny, sám se dotázav na mnohé podrobnosti a který vyslovil akci Esperantistů přání zdaru. V Italii byl velmi příznivě přijat ministrem vyučování, horlivým stoupencem našeho jazyka.

V 11. čísle II. roč. „**Universo**" jsou otištěny velmi zajímavé zprávy ze života dr. L. L. Zamenhofa s četnými obrazy (dr. Zamenhof ve své pracovně, dům, v němž napsal své dílo, skupina předních Esperantistů varšavských a j.). Doporučujeme všem čtenářům předpláceti tuto vzorně redigovanou revui! (Heckners Verlag, Wolfenbütel ap. Dresden. Ročně 7 K.)

*   *

La Komitato de **Universala Esperanto Asocio**, sekve de kongresa deziresprimo, alprenis decidon, kiu prezentas gravan intereson por ĉiuj kolektistoj kaj interŝanĝistoj. Ĝi starigis, interne de U. E. A., specialan fakan asocion destinitan por la kolektistoj. Tiu fako, sub la nomo Universala Interŝanĝa Asocio, grupigos ĉiujn personojn, kiujn interesas la internacia korespondado kaj interŝanĝado. Ĝi konatigos unu al la alia per sia Bulteno, senpage sendota al ĉiuj membroj kaj organizos specialajn servojn por la plimultigo de la korespondoj kaj interŝanĝoj. Aliĝante al la fako, la kolektistoj estos garantiataj kontraŭ nerespondo per speciala regularo, kiu difinas kaj precizigas la rilatojn de la fakanoj unu kontraŭ la alia. Oni scias, ke ĝis nun la manko de tiaj garantioj estis granda malhelpo por regula korespondado inter Esperantistoj. Estas do esperinde, ke ĉiuj seriozaj Esperantistaj korespondantoj kaj kolektistoj aliĝos al la nove kreita fako, kiu pro la disvastiĝo de U. E. A. estos rapide konata en ĉiuj landoj. La speciala faka kotizajo estas 50 sd. jare (kun la Bulteno). Oni povas aliĝi. ĉu per la Delegitoj de U. E. A., ĉu senpere per la **Centra Oficejo de U. E. A. Genève**, 10. rue de la Bourse.

Akademio Esperantista. Post voĉdonado la estraro de la Akademio kaj Lingva Komitato konsistos de oktobro 1911 ĝis aŭgusto 1914 el: prez. rektoro Boirac, vicprezidantoj Dr. Bein kaj Dr. Mybs, direktoro de la sekcio pri gramatiko A. Grabowski, de la sekcio pri komuna vortaro prof. Th. Cart; la demandon pri la derivado studos speciala komisio: Saussure, Grabowski kaj Höveler. La Akademio starigis ankaŭ la regularon por rekompenci verkojn esperantajn, rimarkinde bonstilajn. Ĉiujare ĝi premios maksimume kvin originalajn (prefere) aŭ tradukitajn librojn, kiuj estis en la lastaj dek jaroj prese eldonitaj (memstare) kaj kiujn proponos membroj de la L. K. antaŭ la 1. de marto. La Akademio elektos el deko da verkoj, kiujn rekomendos al ĝi speciala komisio konsistanta el kelkaj Akademioj. Ĉiu membro de L. K.

rajtas proponi du verkojn; tiuj de Akademianoj ne estas rekompenceblaj.

Pri la internacia organizo de la Esperantistoj ni parolos en la proksima numero.

ESPERANTA MOVADO INTER BOHEMOJ.

VI. Všesokolský slet v Praze 1912 a Esperanto. Jak bylo sděleno již u příležitosti loňského II. kongresu Českých Esperantistů, navázal Ústřední Svaz B. U. E. styky s přípravným sletovým výborem, doporučiv mu Esperanto jako jeden z nejlepších prostředků, jimiž známost o sletu může býti v cizině rozšířena. Ve své poslední schůzi přijal výbor VI. sletu návrh Unie a schválil vydati esperantský **leták o cílech Sokolstva**, jehož text napsaný známým pracovníkem v řadách sokolských Vaníčkem, byl Unií do Esperanta přeložen. Přes 3200 těchto informačních listů (s několika vyobrazeními) bude přiloženo ke každému exempláři nejbližšího čísla čtrnáctidenníku „Esperanto" (orgán U. E. A. v Ženevě) a budou dány k disposici i jednotlivým českým Esperantistům, kteří o ně požádají (poštovné!), aby je svým cizím korrespondentům zasílali se žádostí o otištění (v překladu) do národních časopisu. Současně bude Unií vydán informační list o Praze **„Gvidfolio tra Praha"** a rozeslán prostřednictvím U. E. A. všem delegátům do celého světa.

Pri la dato de la nunjara ĝenerala kunveno de la Centra Asocio B. U. E. estos decidite ĉe la plej proksima komitata kunveno. — La komitato de „Občanská záložna v Karlíně" plenumis favore petskribon de la Centra Asocio B. U. E., dediĉinte por subteno de la la esperanta oficejo en Praha 10 kronojn.

En la semajna revuo „Český Svět" aperis artikolo pri la skribarto de s-o Havelka. La specimenaj tekstoj estis verkitaj en Esperanto. Bona propagandilo!

Psohlavci en Esperanto! La emociiga, karakteriza romano de Jirásek, en kiu speguliĝas peco de la bohema historio, jus estas fintradukita de s-o F. K. Svačina en Č. Budějovice. Ni esperas, ke la manuskripto de tiel bela verko ne restos longe ŝlosita en tirkesto, sed ke ĝi trovos baldaŭ vojon en la tutan mondon por esti ankaŭ laŭmerite admirata.

En Praha kaj en Trutnov estis malfermitaj memorhonorigaj ekspozicioj je la glora bohema verkistino Božena Němcová, kiu mortis en j. 1862. En ambaŭ estis elmontrataj inter la granda vico de ŝiaj verkoj tradukitaj en multajn lingvojn ankaŭ la esperanta traduko de ŝia „Babička" (Avineto), kiu aperas kiel aldono al nia revuo.

E. K. en **Praha:** La ĝenerala kunveno okazos la 1. III. vespere en la sidejo „U Donátů". Ĉiuj membroj estas petataj, ke ili redonu la pruntepreniitajn librojn. — La E. K. en **Žižkov** adiaŭis kun sia prezidanto s-o ing. Jar. Sitko kaj kun lia edzino per amika vespero, kiun ĝi aranĝis je ilia honoro la 31. I. en la hotelo „Tichý". S-o ing. Sitko, kiu estis prezidanto de post la fondiĝo de la klubo, esprimas al siaj membroj dankon por la ĉiama harmonio en la societa vivo kaj admonas al senĉesa, persista kaj kuna laboro. Al la foriranta estimata samideano esprimas deziron de feliĉo s-oj prof. Dr. V. Rosický, Winter kaj Poustka. La programon de la festa vespero plenigis plejparte la belaj ludpecoj de la muzika sekcio

de la klubo. kiu tiun ĉi tagon por la unua fojo ebligis al ni admiri la rezultatojn de sia laboro, gvidata de la agema membro kaj propagandisto s-o Václav Novák. La bela prezento de ĉiuj komponaĵoj agrable surprizis la multnombrajn gastojn. La klubo perdas prezidanton, kiun ĝi memoros kiel sian plej ŝatatan amikon kaj kiun ĝi eble eĉ envios al la samideanoj en Brno, kiuj refoje salutos en sia kunvenejo tiel viglan laboranton.

Č. Budějovice. En superplena ĉambro okazis la ĝenerala kunveno (24. I.) malfermita de la prez. s-o Svačina, kiu parolis pri la bezono ĉion ie aŭditan ĉiam atente esplori antaŭ ol oni ekkredas la sensperтajn kritikistojn. La temo aplikiĝis je ataka maniero, laŭ kiu iuj ĵurnalistoj provis „informi" en la lastaj tagoj la legantaron pri nia movado. Unuanime estis elektitaj: s-o faka instr. F. K. Svačina prezidanto, komitatanoj s-oj J. Perek, V. Matouš, H. Veselka, F. Fiala kaj f-ino C. Maťhová. La kunvenoj kaj kursoj okazados de post nun laŭ ĝojiga konsento de ĉiuj dufoje semajne: merkrede kaj sabate. La klubo posedas nun propran skioptikonon kaj de s-o ĉefleŭt. Hollegcha donace ricevitajn grandan portreton de Majstro kaj statistikajn diagramojn pri E. — La lasta parolis la 22. I. antaŭ 122 oficiroj (inter kiuj eĉ la generalo) pri evolucio de Esperanto en la „kazerno de Mario". Riĉa ekspozicio kaj la argumentoj de la oratoro vekis tiom da intereso inter la oficiraro, ke multaj petis jam informojn kaj promesis studi Esperanton. — La klubo elektis unuanime sian prez. s-on *F. K. Svačina honora membro.* Transdono de la diplomo okazis ĉe speciala festo la 1. II. en la gastejo „Na rychtě". Tiu ĉi vespero estis la plej elokventa esprimo pri varma simpatio kaj amo al la longjara pioniro de nia movado, ĉe kiu okazo esprimis al li ĉiuj klubanoj sian korsinceran dankemon por la senlaca, persista kaj fervora agemo dum plenaj dek jaroj, per kiu li vekadis en ili amon al la bela ideo, amon al Esperanto. Ĉiuj amikoj, kiuj konas s-on instruiston Svačina, ĝojas kune kun ni pri la plenmerita eminentigo, per kiu la klubo, ĉe kies fondo kaj evolucio li estis ĉiam la influa faktoro, esprimis al li la plej altan honoron. La festa vespero komenciĝis per parolado de s-o ĉefleŭtenanto Hollegcha, kiu aludis la ĉefajn meritojn de la eminentigito. Ĉe fino de sia emfaza parolado li prezentis la diplomon al s-o Svačina dum brua aplaŭdo kaj ĝoja vokado de ĉiuj ĉeestantoj: Li vivu! Tujsekve ekkantis kelkaj membroj la festenan melodion „Li vivu, li vivu, nia prezidant'." — En nomo de la virinoj prezentis poste al li florbukedon f-ino Maťhová. S-o Svačina dankis kun modesteco ĉe li konata al ambaŭ festparolintoj. Per personaj gratuloj de la gastoj kaj legado de telegramoj finiĝis la solena sceno, post kiu estis prezentataj la kanto „Al la fratoj" sub gvido de s-o ĉefleŭt Hollegcha, deklamludo de muzikinstruistino f-ino Vinklerová kaj kelke da naciaj kantoj, kantataj de s-o Kühn. Amikeca humoro retenis la societon en la plej intima amuzado ĝis malfrua horo. La klubo dankante al ĉiuj partoprenintoj, speciale al tiuj, per kies laboro estis atingita bela sukceso de la kunveno, unuavice al s-o ĉflt. Hollegcha, esprimas dankan rememoron al akad. pentristo s-o Havelka, kies artisme mandeŝegnita diplomo estis surprizo por ĉiuj. — E. K. en **Rakovník**: Ĝenerala kunveno 21. I., malfermita per interesa parolado de s-o H. Černý „Pri la progreso de Esperanto" aprobis unuanime la raportojn prezentitajn de la komitatanoj kaj elektis: s-on H. Černý prezidanto, f-inon Wáchová vicprez., s-on Jar. Pokorný sekr. kaj

s-ojn Ringler, Holý, Číp. La kunvenoj okazados ĉiun merkredon vespere en la gastejo „u České koruny". Tie havos lokon ankaŭ la instruaj lecionoj (lunde, merkrede). Jara kotizajo 4 K. Per klopodo de la prezidanto estis aranĝita kolekto de portretoj de la membraro, kies bildon la klubo dediĉis ankaŭ al B. U. E. El la raportoj pri la pasinta jaro ni citas: sume okazis 31 kunvenoj, kvar kursoj, unu propaganda parolado, kvar amuzaj vesperkunvenoj, teatra amuzo kaj kvar ekskursoj al Křivoklát, Nový Dům, Merkovka kaj Kladno. — E. K. en **Písek** elektis en la ĝ. k. la 18. II. la sekvantajn kiel membrojn de la komitato: f-inon Křivancová kiel prezidantinon, f-inon Hálková kiel vicprezidantinon, f-inon Kvardová kiel sekretarion kaj f-inojn Kotašová, Spieglerová, s-on A. Hrubec. — E. K. en **Radvanice** (Silezio). Ĝ. k. okazis la 21. I. Laŭ raportoj de la komitatanoj havis la klubo je fino de la pasinta jaro 43 membrojn. Spezo de la kaso: 447 K. Alvenintaj kaj responditaj leteroj 350. Biblioteko: 90 volumoj valorantaj 175 K. Inventario de la klubo valoras 300 K. En la kaso 52 K. Dum la pasinta jaro okazis 22 kunvenoj, tri teatraj amuzoj, unu kurso kaj danclecionoj. La ĝ. k. unuanime nomis s-on F. Dvorník prezidanto, s-ojn Brynda, Stachura, Sokolský, Beran kaj Menšík membroj de la komitato. Laŭ decido de la kunveno estis fiksita: la kotizajo estu 4 K jare (kun senpaga ricevado de la revuo Ĉ. Ĉ. E.) kaj 2 K (sen revuo); la klubo fariĝu membro de la „Matice Osvěty Lidové" por la j. 1912; estu senditaj 10 K por la Zamenhofa propaganda fondo al B. U. E.; kiel delegito por la VIII. kongreso en Kraków estas nomita s-o V. Cimr. Sub prezido de s-o Cimr estu fondita lingva sekcio, poste financa (s-o Dvorník) kaj amuza (s-o Záborec). La financa zorgos unuavice pri starigo de „fonda kapitalo" da 100 K. La klubo, estante la sola esperantista centro en la tuta dukolando Silezio, havas tre signifoplenan pozicion; tial al ĉiu ĝia sukceso ni gratulas kore. — Belan feston en la Nacia Domo aranĝis la Bohema E. K. en **Wien** la 1. II. En dekoraciita ĉambrego kunvenis 200 personoj por aŭskulti la amuzan programon konsistintan el kantoj, muziko, kaj esperanta parolado de s-o K. Macháček kaj el bohema de s-o Klimeš. Inter la gastoj ĉeestis ankaŭ multaj samideanoj germanaj (40) en kies nomo parolis s-o Dr. Engler, akcentante la komunan celon de ĉiuj niaj laboroj. Laŭdan rememoron pri Unio prezentis s-o JUC. Siebenschein. Ĉiuj lokaj esp. societoj estis reprezentitaj ĉe tiu ĉi kunveno. Samtempe estis elmontrita por celo propaganda kolekto da 100 esp. gazetoj kaj aliaj esperantajoj. La festo, kies bela aranĝo de ĉiuj estis laŭdita, daŭris ĝis noktomezo. Pri la rememorata festo skribis al prezidanto ankaŭ la ĉeestinta pola gasto s-o Eska laŭdajn vortojn.

E. K. en **Liboc** aranĝis kun sia ĝ. k. la 4. II. boheman deklaman kaj teatran amuzon.

Bohemoj en fremdlando. En **Bremen** senĉese laboras en la vicoj de la multaj tie loĝantaj Bohemoj s-o Rud. Maryška. Kiu mem iam provis gajni por Esperanto pli vastan publikon, scias, kiom da pacienco estas bezone apliki por renkonti sukceson. Absolvinte la kursojn pri E., s-o Maryška ekserĉis inter siaj samlandanoj, ĉu iu el ili montros inklinon al nia ideo. Dufoje li veturis al Delmenhost, kie li starigis nun de li gvidatan kurson por 15 Bohemoj. En aliaj lokoj kaj societoj li ne havis tiom bonan ŝancon. Fine li anoncis, ke li instruos en speciala ĉambro en Bremen kaj sukcesis trovi dek novajn adeptojn. Ni esperas, ke ni povos paroli pri liaj

pluaj sukcesoj la proksiman fojon. — En Germanujo mortis antaŭ nelonge nia fervora samideano s-o *Josef Kubík*, kiun multaj konis kiel simpatian amikon. En Ŕetenice li gvidis kurson jam antaŭ multe da jaroj; forveturinte poste Amerikon, ankaŭ tie li ageme laboris en vicoj de Esperantistoj kaj nun, kiam li revenis Eŭropon, la senkompata morto finigis lian vivon. Ni estimu lian memoron.

Členové Svazu platí roční příspěvek **4 K;** mají k disposici **knihovnu** (knihy zasílají se jim na dobu 14 dní poštou za náhradu porta) a dostávají **zdarma tuto revui.** Nově přihlášeným zasílán zdarma **odznak. Adresujte redakci „Časopisu Č. E." s pozn. „pro jednatele svazu."**

Do knihovny Svazu „Ligo de Bohemaj Esperantistoj" byly přijaty následující knihy (viz seznamy v roč. III., IV., V. a VI.):

č. 80. Dr. Rudy: *Venĝo venĝita* (12 bildoj kun esp. teksto);
č. 81. Gogol - Dr. Fišer: *Portreto* (85 pĝ.);
č. 82. Čefeč: *Pluaj argumentoj* (kontraŭ la teorio pri gramatika karaktero de radikoj en Esp. (11 pĝ.);
č. 83. Tolstoj - Šidlovskaja: *Tri mortoj* (23 pĝ.);
č. 84. Gordon - Gogo: *Kara Panjo*, unuakta komedio (35 pĝ.);
č. 85. Senoa - Kolar Krom: *La trezoro de orajisto* (290 pĝ.);
č. 86. Frenckl: *Krestomatio por infanoj kaj komencantoj* (34 pĝ.);
č. 87. Mr. Luiscius: *Karaktero* (30 pĝ.);
č. 88. W. Wolski - A. Grabowski: *Halka*, opero en 4 aktoj (38 pĝ.);
č. 89. J. Słowacki - A. Grabowski: *Mazepa*, 5-akta tragedio (90 pĝ.);
č. 90. Biblio II. libro - Dr. L. L. Zamenhof: *Eliro* (99 pĝ.);
č. 91. Pola Esperantisto: *Antaŭen kun kredo* (203 pĝ.);
č. 92. H. A. Luyken: *Paŭlo Debenham*, romano *originale* verkita en Esperanto (227 pĝ.);
č. 93. E. Privat: *Pri la esperanta literaturo* (24 pĝ.);
č. 94. A. Behrendt: *El la domo tie kontraŭe* (14 pĝ.);
č. 95. Dr. Forel - Dr. Uhlmann: *Kulturceladoj* de la nuntempo (14 pĝ.).

Příspěvky na **Zamenhofův fond** 100.000 hal.: Nejmenovaný 10.500 hal., s-o parohestro Brandejs en Zl. Koruna 300 hal., nejmenovaný 100 hal., s-o V. Cimr en Mor. Ostrava 150 hal., f-ino N. Žabková en Praha 225 hal., dohromady: 11.275 hal.; poslední výkaz 55.971 hal. **Celkem 67.246 hal.** (K 672·46.)

BIBLIOGRAFIO.

H. A. Luyken: *Paŭlo Debenham* K 2·40 (227 pĝ.). Eld. British Esperanto-Association, London W. C.

„Paŭlo Debenham" meritas nian specialan atenton; ĝi estas libro, kiu povas en nacilingvaj tradukoj tiel bone atentigi pri Esperanto, en kiu ĝi estas **originale** skribita, ke eĉ per paroladoj oni eble ne sukcesus tiel detale kaj firme konvinki la aŭdantojn pri la formovaria riĉeco de nia lingvo. Ni aŭdu, kion diras pri ĝi s-o Br. Kuhl:

„. . . Kiam mi komencis legi la afable de la aŭtoro pruntedonitan manuskripton, ironia rideto ekludis sur miaj lipoj: ĉu povas esti, ke Anglo konu la terurajn rilatojn en la ekstrema oriento de Eŭropo? kaj fine traleginte kun haltigita spiro la aventurojn de Paŭlo kaj Vera, mi ekdemandis kun dubo: ĉu la okcidentano ekkredos pri la ebleco de tiaj rilatoj, ĉu li ne diros: ne en la XXa jarcento tio jam ne povas okazadi . . . kaj tamen jes, tio estas ne nur ebla, sed eĉ tiel okazas. La aŭtoro intuitive ekkonis

en tiuj elegantaj, bonkondutaj, „kulturplenaj" sinjoroj kaj „grafinoj" senzorge vagantaj tra salonoj de ĉiuj eŭropaj metropoloj kaj sopire interparolantaj pri libereco de sia rusa patrolando simplajn spionojn kaj ĝendarmojn el Oĥrana. Jes, karaj okcidentanoj, tio estas vera, eĉ tro malmulte vera, ĉar ankoraŭ pli grandaj friponaĵoj okazadas!

Tio estas unu flanko de la romano, kiu por mi, loĝanta proksime de la vasta rusa imperio, ne estas nova. Sed restas en la verko alia ankoraŭ pli grava flanko: klarigita en ĝi estas la mistero de angla potenco, spirita kaj morala: la misiejoj. Nenie mi sukcesis trovi tiel plastikan kaj kolorplenan bildon de tiu grava kultura faktoro tiel speciala kaj karakteriza por Anglujo.

Le roi est mort — vive le roi! La plumon elfalintan el la mano de D-ro Vallienne levis la aŭtoro de „Paŭlo Debenham" kaj tenas ĝin inde. Ĉar eĉ laŭ stila vidpunkto oni vidas progreson. Nur ekzistas unu granda diferenco: kiam la romanoj de la unua esperanta verkisto, eble eĉ kontraŭ lia intenco, malkvietigas la animon kaj ekscitas la nervojn, la verko de la nova aŭtoro enverŝas en la koron pacon kaj serenecon, tiel necesajn en niaj tempoj. . ."

Ĉe la sama eldonejo aperis:

Marshall-Mann: *Picture lessons in Esperanto,* scenes from every-day life (12 × 18, 12 pĝ.). Prezo? Tre bona helpilo por superaj kursoj, instiganta enkonduki la konversacion.

Ĉe Presa Societo Esperantista, Paris, 33. rue Lacépède:

Walter Gordon: ***Kara panjo,*** unuakta komedio trad. el la angla lingvo de Zego (11 × 17; 35 pg.). Prezo 75 h. — Leo Tolstoj: ***Tri mortoj,*** el la rusa lingvo trad. M. Ŝidlovskaja (12 × 19; 23 pĝ.). Prezo 40 h. — E. Privat: ***Du paroladoj.*** Vivanta lingvo de vivanta popolo. Pri la vivo de Esperanto (12 × 19; 12 pĝ.). Prezo 25 h. — Bossuet: ***Funebra parolado*** pri Louis de Bourbon, princo de Condé, el la franca lingvo trad. L. Bastien (11·5 × 17·5; 69 pĝ.). Prezo 1 K. — Lesage: ***Ĝil Blas de Santillana.*** Ĉapitroj elektitaj kaj trad de Raoul Busquet (11·5 × 17·5; 76 pĝ.). Prezo K 1·25. — Lord Byron: ***Parizina;*** el la angla poezio esperantigis Dr. Venancio de Silva (14 × 18; 21 pĝ.). Prezo 50 h. — Era: ***Raporto pri la VII. kongreso en Antverpeno 1911.*** Eltirita el Lingvo Internacia (13 × 20; 62 pĝ.). Prezo 75 h.

Ĉiuj ĉi tiuj verketoj meritas aprobon de literaturmantoj, estante verkitaj en bonstila Esperanto, kiel ĉiu, ĉe P. E. S. eldonita libro.

POST LA AŬSTRIA KONFERENCO.

Ĉar ĉe la aranĝo de la aŭstria konferenco 1911 en Praha okazis malinterkonsento inter la germana „Esperanto-Verein Verda Stelo in Prag" kaj la aranĝinto de la konferenco „Centra Asocio Bohema Unio Esperantista" pro la eksigo de tri aliĝintoj al la konferenco (vidu la oficialan raporton en la 7. 8. n-oj de „Časopis Českých Esperantistů" kaj la Malferm. Respondon en la 11. n-o de „German-aŭstria Esperantisto") trovis ambaŭ korporacioj utila por la esperanta afero serĉi vojon, laŭ kiu estus restarigebla la antaŭa interkonsenta, modela kunlaboro de ambaŭ

diversnaciaj korporacioj. Por tiu celo kunvenis la 22. XII. 1911 reprezentantoj de ambaŭ unuiĝoj kaj aprobis kune redakti la sekvantan informon, kiu estas publikigota en „Časopis Českých Esperantistů“ kaj en „German-Aŭstria Esperantisto“.

DEKLARACIO.

1. Kvankam la unuiĝo „Esperanto-Verein Verda Stelo in Prag“ nenion sciis pri la eksigo de du personoj el la Unua Esperanto Tago en Wien 1910, tamen eĉ se ĝi estus tion sciinta, ĝi estus konservinta sian opinion, ke neniu havas la rajton eligi iun ajn Esperantiston el esperantista kongreso; kaj en okazo, se ĝi estus tion sciinta, ĝi ankaŭ tiame estus rifuzinta sian partoprenon: kontraŭe estu konstatite, ke la bohemaj reprezentantoj ĉe la Unua Esperanto Tago en Wien 1910 eksciinte pri la rifuzo de legitimacioj al du membroj, daŭrigis tamen la kunlaboron.

2. La unuiĝo „Verda Stelo“ konstatas, ke en la kunsidoj de la prepara komitato de la II. Konferenco 1911 en Praha la estraro de „Centra Asocio Bohema Unio Esperantista“ proklamis la decidon de la ĝenerala kunveno de B. U. E., ke ĝi absolute ne rilatos kun la personoj nomitaj. Sed la reprezentantoj de „Verda Stelo« neniel komprenis tion en tia senco, ke B. U. E. intencas rifuzi al iu la aliĝon al la konferenco.

3. Ĉar la unuiĝo „Verda Stelo“ eksciis, ke ĝia rimarko en la Malferma Respondo rilate la afiŝojn, kvazaŭ ĝiaj reprezentantoj estus pagintaj unu trionon de la elspezoj, kaŭzis malkomprenon, ĝi konstatas, ke ĉi tiu rimarko koncernis sole la proponon antaŭan, kiu poste ne plu estis efektivigita.

4. Je fino estu konstatite, ke „ekzistas ĉe la reprezentaro de Centra Asocio Bohema Unio Esperantista kaj ekzistis la ideo de komuna kunlaboro kaj ankaŭ ke la aŭstria Germanaro esperantista konas la ideon de egalrajteco ankaŭ sur la neŭtrala lingva fundamento“.

La unuiĝo „Verda Stelo“ kaj „Centra Asocio B. U. E.“ proklamas, ke la diversaj ambaŭflankaj malkompreniĝoj, kiuj estis post reciproka diskutado klarigitaj, neniel estas kapablaj detrui la ĝisnunajn amikecajn rilatojn inter la ambaŭ subskribitaj korporacioj, kiuj sekve, laborante por Esperanto iros la komunan vojon!

Esperanto - Verein „VERDA STELO“	„CENTRA ASOCIO BOHEMA UNIO ESPERANTISTA“.

Ĉar ni refoje spertis tion, ke la raporto de la Grupo „Verda Stelo“ (presita en la German-Aŭstria Esp.) estis malĝuste komprenata kaj komentari ata, ni vidas nin devigataj aldone al tiu,

laŭdire „im Feuer des Gefechteš“ skribita raporto (esprimo uzita ĉe okazo de la suprenomita kunveno en la kafejo Edison) rimarkigi la jenon: Rilate aserton, kvazaŭ neniu en la preparaj kunvenoj estus parolinta pri la rifuzo de kelkaj por ĉiam el bonmora societo eksigitaj Esperantistoj, estu konstatite, ke male ĉiuj ceteraj ĉeestintoj atestas, ke tiu fakto estis priparolita la 11. de aŭg. tute klare, kompreneble sen longaj ĉirkaŭfrazoj, ĉar oni konsideris la tempon pli grava. Sekve la teksto, skribita de „Verda Stelo“ por G.-A. E. eztis diktata de iu ajn alia sento, sed neniel de veramo.

KORESPONDANTOJ: Českým dopisovatelům, kteří hledají styky s cizími Esperantisty, doporučujeme, aby uveřejnili svou adresu v některém časopise cizozemském, který má své čtenáře roztroušeny po celém světě. Přeje-li si kdo navázati styky pouze s tou neb onou zemí, nechť zašle svou adresu redakci místního propagačního časopisu esp. Poplatek za uveřejnění v *Lingvo Internacia* (Paris, 33. rue Lacépède) za řádku o 10 slovech 50 h. — *Revuo* (Paris, 79. Bd. St. Germain) za každých pět slov 15 h. — *Esperanto* (Genève, 10. rue de la Bourse) 15 slov (2 řádky) 50 h. — *The British Esperantist* (London W. C. High Holborn 133) tři řádky po 7 slovech 60 h. — *La Ondo de Esperanto* (Moskva, 26. Tverskaja) tři řádky po 7 slovech 70 h, další řádka 35 h. S přihláškou jest třeba zaslati současně poplatek, nejlépe v mezinárodních kuponech „Coupon réponse international“, který stojí na poště 28 hal. a který může příjemce v kterékoliv zemi vyměniti za známku v ceně 25 hal.

La adresoj de fremdlandaj korespondantoj estas en nia revuo Ĉ. Ĉ. E. anoncataj senpage.

Adresy českých dopisovatelů jsou sbírány Ústř. Svazem Bohema Unio Esperantista a budou opět vydány v samostatné brožuře, která bude rozeslána hlavním esp. spolkům do celého světa. Přihláška 40 h. Každý, kdo zašle svou adresu, obdrží 1 ex. Adresáře zdarma. Dokud není sebráno 300 adres, nemůže nové vydání vyjíti.

*19. S-o Franz Roehrig, *Frankfurt a. M.* Abtsgässchen 11. Germanujo. — *20. S-o Rud. Majer, *Frankfurt a. M.* Rödelheimerlandstr. 24. Germanujo (il. k.). — *21. S-o Ant. Bogyo, oficisto; *Apatin,* Jaroslavosáp. Hungarujo. — *22. S-o Armando Castillo I. *Santiago* 7. Chille (int. p. markojn, ne la fr. kaj germ.). — *23. F-ino Mario Graells *Tarrasa*, str. Paseo 11. Hispanujo. — *24. S-o A. A. Ternovskij, *Niž. Novgorod,* Verhnaja naberežnaja, 8. Ruslando (il. k.). — *25. F-ino Roze Francis, *Barcelona*, str. Montaner 38. Cajos, Hispanujo (kor. kun Bohemoj). — *26. S-o Fr. Cagaŝ, *Paris*, rue des Acacias 4. (dez. kor. kaj interŝŝ. fotografaĵojn kun geamatoroj). — *27. „Internacia societo de diverslandaj kelneroj“ dez. kor. kun bohemaj kolegoj. Adreso: *Paris.* 51. rue de Clichy. Centra Of. Esp. — *28. S-o Etienne Hemeleers. *Bruxelles,* 226 bhaussée de Haecht, Belgujo (int. p. m.). — *29. S-o P. Barbe, *St. Omer.* Lycée. France, P. de C. — *30. S-o Alb. Bock, *Ganshoren,* Lez-Bruxelles, 152. rue Communale. Belgujo (il. k.). — *31. S-o S. Pšenickij, *Walkovysk,* Grod. gub. Ruslando (dez. kor. kaj kolektas esp. gaz.). — *32. S-o Geo L. Howe. *Albany,* Oregon U. S. Amer. (il. k. ĉiam tuj resp.).

C. Charrier, Zaballa 111. Montevideo (Uruquay) Ameriko **vendas** la plej grandan kolekton da esp. poŝtkartoj kiu enhavas **20.000 kartojn.**

Eldonanto: Ed. Kühnl. — Presejo de Národní tiskárna a nakladatelství, společnost s r. o. v Praze.